


Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2020

Jarkolekto 7 – Numero 1



Medalego de la skulptisto Frits Sieger (1966) en la nederlanda urbo Zwolle

ENHAVOTABELO

de januaro 2020

Titolpaĝo: <i>Quinten Metsys (1466 - 1530)</i>	
<i>Petegantaj farmistoj en la oficejo de impostkolektistoj</i>	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni!	3
Moneroj & medaloj	5
<i>XXa Universala Kongreso de Esperanto 1928</i>	
<i>Lovenaj klubaj memormedaloj rilate al serĉpromenoj en 1980/1981</i>	
<i>IXa Universala Kongreso de Esperanto 1913</i>	
<i>Memormedalo Rikardo Ŝulco (1906 - 1997)</i>	
<i>Odeso 200 jaroj 1794 – 1994</i>	
<i>Centjara esperanto-jubileo en Latvio</i>	
Medalistoj: 20 Ateliero Holy Frères	14
Nekrologo	15
Spikumajoj & suplementoj: Reuzita medalo de Rik Sauter el 1927(?) .	18
Por spuremuloj!	20
Terminaro: alfabeto listo (20)	21
Aspektoj de numismatiko: Plumbosigeloj kaj aliaj sigeliloj (1)	22
Historiaj aspektoj: Esperanto-numismatiko en uniformo (4).....	25
Numismatika forumo: Ĉu oni reviziu la spesmilon?	27
Reĝustigo	29
El la gazetaro	30
Retpoŝto	32
Anoncoj & eventoj: Kiel mendi la UK-medalon 2020 de Montrealo? ...	39

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be
Retejo: <http://ena.frali.bplaced.net>
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!

Permesu, **karaj membroj kaj legantoj**, ke ni enkonduke atentigas vin pri anstataŭiga interveno, kiu tutsilente okazis lastatempe. En nia ĉefa rubriko “Moneroj & medaloj” ni fakte anstataŭigis la sufiĉe pesimistan nocion “nekonata” per pli optimisma, pli pozitiva nocio: “*serĉata*”. Tiu ja estu la **ŝlosilvorto** en tiu rubriko, kiu estu la fundamento de fareda katalogo.

Sufiĉe da homoj jam okupiĝadis, ekde la komenco de la historiografio ĝenerale kaj precipe ekde la apero de la “Unua Libro”, pri diversaj kulturfenomenoj, kiel pagiloj kaj medaloj (numismatiko), aŭ pri (esperantaj) kulturfenomenoj kiel verkado, pedagogio, historio, filatelo ktp. Nur ne pri esperanta numismatiko...

Malgraŭ tre maloftaj spuroj de personoj iam kolektantaj kaj priskribantaj (ekz. en gazetaj anoncoj) esperantajn numismatikaĵojn, ne eblas trovi rezultojn de provoj, por kompili bildojn kaj priskribojn en iu “**Internacia Esperanto-Numismatika Katalogo**”. Malpli da signoj krome rilate al la kompilado de esperantlingvaj numismatikaj terminoj. La ĝenerala, mond vasta numismatiko tamen havas longan tradicion, sed antaŭ la renesanco verkoj pri numismatiko estis sufiĉe raraj. Nuntempe ekzistas amaso da detalaj katalogoj kaj monografioj pri ĝenerala kaj speciala numismatiko, tre bone konataj tutmonde en rondoj de kolektantoj kaj numismatoj.


Esplorantoj de la “juna” esperanta niĉo dependas tro ofte de apenaŭ akireblaj fontoj en nekonataj arkivoj. Jen do “amatoroj”, kiuj devas peni palpetante en mallumo, sed ili tamen ne plendu! Dum la lastaj jaroj rimarkindas, ke ĉe esperantistoj kaj esperantaj asocioj la emo reagi efike je la informpetoj pri unuopaj moneroj kaj medaloj vere kreskas. Regule, enigmoj en la rubriko “Por spuremuloj”, estas parte aŭ tute solvataj. Sufiĉe ofte per “Retpoŝto” envenas leteroj pri aspektoj de jam priskribitaj artefaktoj. Tio certe estas tre pozitiva evoluo!

Jen do kelkaj konstatoj en nuksoŝelo kaj pri la pasinteco kaj pri la estonteco. Do, la ĝusta momento por enfokusigi la aktualan rikolton de la ENA-agado. Ni tial prezentas tri grafikaĵojn sur la sekvonta paĝo, kiuj koncize montras la aktualan kreskon de nia asocio. Nuntempe, dank’al 30 novaj membroj en la pasinta jaro, ENA havas 138 individuajn membrojn el 42 landoj, kaj stabilan nombron de 21 asociaj membroj el 15 landoj. Dum la antaŭaj ses jaroj ni bedaŭrinde ankaŭ perdis kvar membrojn pro forpaso, aktuale el ili du tre aktivajn samideanojn kaj ENA-membrojn, kiujn ni honore laŭdas en la rubriko “Nekrologo”.


Dum la pasintaj ses jaroj estis jam eldonitaj 24 numeroj de la revuo, averaĝe 40 A4-paĝaj, ankaŭ multe da fotoj kaj aliaj ilustraĵoj, tiel ke la fama privortara fakulo Petro De Smedt antaŭ nelonge nomis ĝin “bela kaj luksa revuo”!

Do, kore dankante ĉiujn, kiuj kunlaboris kaj/aŭ (re)sendis al ENA bondezirojn por 2020, ni daŭrigas inviti vin al kunlaborado. Koncerne la daŭrigendan agadon ni diru: DO KUNE EK!


Bert



“ENA-landoj” kaj laŭlandaj nombroj de individuaj membroj fine de 2019



Laŭjara kreskado de individuaj membroj dum la pasintaj jaroj (2012: + 2; > 2019: + 30)




Laŭlandaj nombroj de asociaj membroj, kiel universitatoj, bibliotekoj, muzeoj kaj diversaj (ne)esperantaj asocioj

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo G 1 – Ordenaspektaj medaloj

XXa Universala Kongreso de Esperanto 1928



Lando: Belgio

Metalo: bronzo

Mezuroj: 45 mm x 30 mm

Jaro: 1928

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 13,13g

Medalisto: *serĉata*

Diko: 1 mm

Averso:

Tre riĉa bildaro kun ene ornamita stelo kaj bildfragmentoj de

- Velŝipego kvinmasta
- Brabo-fontano en Antverpeno
- katedralo de Antverpeno

Supra teksto: ANTVERPENO

Suba teksto: XX° UNIVERSALA KONGRESO DE
E S P E R A N T O
3-11 AŬGUSTO 1928


Rimarko 1:

Ornamcelaj elementoj en la anguloj (branĉetoj, ondoj, kurbaĵoj) kaj en la stelo mem: karakterizoj de novarta stilo (fine de la 19a, komence de la 20a jarcentoj).



Rimarko 2:

Brabo-monumento sur vendoplaco, kreita surbaze de eposo pseŭdo-etimologia pri la deveno de la nomo “Antwerpen”.



Rimarko 3:

La antverpena katedralo



Rimarko 4:

Tri koloroj en la rubandeto: - ruĝa & blanka por la urbaj koloroj
- verda & blanka por Esperanto

Tipo H – Industriaj medaloj kun esperanta(j) aldono(j)

Lovenaj klubaj memormedaloj rilate al serĉpromenoj en 1980/1981



Tipo 1



Tipo 2

Lando: Belgio
Kvanto: kun teksto: ± 40
Metalo: *serĉata*
Pezo: 14,35 g
Mezuroj: 32 mm x 37 mm
Medalisto: *serĉata*
Jaro: 1980
Diko: 2 mm

Lando: Belgio
Kvanto: kun teksto: ± 40
Metalo: *serĉata*
Pezo: 18,55 g
Mezuroj: 30 mm x 40 mm
Medalisto: *serĉata*
Jaro: 1981
Diko: 3 mm

Aversoj:

Kvarangula medaleto kun ene cirkla kartuŝo. En ĝi: bildo en perspektivo de sep promenantoj en senkreskaĵa pejzaĝo. Pendigilo kun ĉenereto.

Neregula, ortangula medaleto. Perspektiva bildo de kvar promenantoj en pejzaĝo kun foliarbo. Pendigilo kun ĉenereto.

Reversoj:

Gravurita teksto:
“ESPERANTO 2000 13-7-80”

Gravurita teksto:
“ESPERANTO 2000 12-7-81”

Rimarko 1:



Afiŝa anonco en la nederlanda pri la tria serĉpromeno de Esperanto 2000.

“Esperanto 2000” estis la nomo de Esperanto-klubo en Loveno (Leuven, Belgio). La grupo ankoraŭ ekzistas kaj nun aktivas sub la nomo “Esperanto 3000”, antaŭrigardante al la (kluba) estonteco. Esperanto 2000 estis fondita en la 3a de majo 1979, la nomŝanĝo al Esperanto 3000 datas el 1999.

Rimarko 2:

Ne temas pri arta medalo, sed industria amasmemoraĵo por (krompagintaj) partoprenintoj.

Rimarko 3:

Ambaŭ variaĵoj estis aĉetitaj ĉe firmao Arteel en Loveno, kiu gravur(ig)is la reversan tekston. Pro la industria fabrikado, unuflanke ne vere gravas scii la kompletan eldonkvanton, aliflanke estus interese scii iom pli pri la metalo (aŭ alojo) kaj pri la medalisto.

Ni kore dankas nian Marc Vanden Bempt (Belgio) pro la medaloj kaj la informoj!

Tipo D 1 – Esperantaj unuflankaj medaloj

IXa Universala Kongreso de Esperanto 1913



Lando: Svisio

Kvanto: *serĉata*

Metalo: kupro-nikelo

Pezo: 2,47 g

Jaro: 1913

Medalistoj: Holy Frères

Diametroj: stelo > 33 mm
medalo > 21 mm

Diko: 2 mm

Averso: (*unuflanka medalo*)

sur kvinpinta (Esperanto-)stelo en la fono kuŝas medalo kun urba vidaĵo de Berno.

surskriboj: supre: IX.UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

 sube: 1913 BERN HOLY F^{RES}


Rimarko 1:

antaŭplane: vidaĵo de la “Kirchenfeldbrücke”
(=preĝejkampa ponto)



Rimarko 2:

Doktoro Zamenhof estis honora gasto de la 1a ĝis la 9a UK, do ekde Bulonjo ĉe Maro (1905) ĝis Berno (1913). Pro la eksploda komenco de la granda milito ĉiuj ĉeestantoj de la deka Kongreso en Parizo (1914) kun 3739(!) aliĝintoj devis ĥaose kaj plej rapide returni sin hejmen, ankaŭ la familio zamenhofa. Dum la milito, en 1915, tamen okazis la 11a UK en Usono kun 163 partoprenantoj... En 1917 forpasis la iniciatinto de Esperanto.

**ESPERANTO-CENTRO**poŝtako 1450
D-4790 PADERBORN**Rikardo Ŝulco** (Richard Schulz):
**Europäische Hochsprache oder
Sprachimperialismus?**

256 Seiten. Kartoniert. DM 15,80

Mein geliebtes EsperantoDritte erweiterte Auflage. 244 Seiten. Kartoniert.
DM 16,80Traduko. **La perdita honoro de iu Katarino
Blum'** (Henriko Boelo)

154 paĝoj. Tole bindita. DM 14,80

Traduko. **Pendumilaj Lidoj**

(Kristiano Morgenŝterno)

108 paĝoj. Kartonita. DM 14,80

Traduko. **Palmŝtrojmo** (Kristiano Morgenŝterno)

182 paĝoj. Kartonita. DM 14,80

**La Trombonoj de Jeriko / Die Posaunen von
Jericho**Dulingva eldono, kun muzika komponaĵo (polonezo)
kaj desegnaĵoj.

68 paĝoj. Kartonita. DM 12,80

Vespero jam fariĝis. Agregajoj kaj Robajoj

128 paĝoj. Kartonita. DM 16,80

PLEDO por unueca lingvo.

Esperantologiaj artikoloj kaj eseetoj.

288 paĝoj. Kartonita. DM 45,-

Biografio

Richard Schulz naskiĝis la 12-an de julio 1906 en Hamburgo. Li forpasis 91-jara la 26-an de oktobro 1997 en Mindeno (Germanio).

Esperanton li konis jam de sia juneco, sed li aktiviĝis nur post la emeritiĝo. Ŝulco grave kontribuis al la disvastigo de Esperanto en la germanlingvaj landoj, precipe per sia germanlingva libro *Mein geliebtes Esperanto* ("Mia amata Esperanto").

De 1979 ĝis 1987 li eldonis la *Vestfaliajn Flugfoliojn* (en la lastaj jaroj nomataj *Vestfalujaj Flugfolioj*), poste li publikigis interalie en la *Specialaj Cirkuleroj* de la Esperanto-Centro Paderborna de Hermann Behrmann.

Aŭtoro kaj tradukinto de beletraj kaj sciencaj verkoj, Schulz interesiĝis ankaŭ pri gramatiko kaj leksikologio. Li bazis siajn ideojn sur la lernolibro de Luis Mimo Espinalt kaj publikigis ilin sub la nomo *Analiza Skolo*. Al lia idearo apartenis interalie la radikala esperantigo de ĉiuj nomoj; sin mem li nomis esperantlingve *Ŝulco Rikardo*. Dum adeptoj de la Analiza Skolo panegire laŭdis liajn tradukojn de liriko, kelkaj fakuloj pri esperanta poezio forte kritikis lin.

Schulz estis profesoro de AIS kaj kontribuis al pluraj ĝiaj studadsesioj.

En 1993 Richard Schulz estis honorita per FAME-premio.

Fonto: https://eo.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz

Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

Memormedalo Rikardo Ŝulco (1906 - 1997)



Lando: Germanio (?)

Metalo: bronzo (muldita)

Diametro: 119 mm (!)

Jaro: *serĉata*

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 590 g (!)

Medalisto: *serĉata*

Diko: 4-9 mm

Averso:

busto de Richard Schulz maldekstren kun “manskribe” liaj antaŭ- kaj familia nomoj en Esperanto: *Rikardo Ŝulco*. Ankaŭ eta pentagramo.

sube: signo aŭ inicialo?: *serĉata*.

Reverso:

regnoglobo (imperia globo) kaj sur ĝi pentagramo. La konekto kun la Ŝulco ne estas klara. Sen surteksto.

Rimarko 1:

la montrata ekzemplero havas en la rando la numeron 3.

Rimarko 2:

regnoglobo kaj scepro estas simboloj de la reĝa potenco.

Rimarko 3:

pentagramo: kvinpinta stelo; tre malnova simbolo. Klasikgreka deveno. Signifo: “kvin linioj”.

Tipo D 1 – Unuflankaj medaloj

Odeso 200 jaroj 1794-1994



Lando: Ukrainio

Kvanto: 1 (?)

Substanco: argilo

Pezo: 29 g

Diametro: 71mm

Medalisto: Aleksandr Solomin

Jaro: 1994

Diko: 6,5 mm

Averso:

la medalo estas naŭpinta kaj unuflanka.

supre: pendigilo por ŝnuro aŭ ĉeno.

meze: la bildo montras stelon kun litero E kaj branĉeton.

ĉirkaŭa surskribo: "AL ODESU - 200 JAROJ
1794 1994"

Rimarko 1:

la medalo estis emisiita okaze de la 200a jariĝo de la urbo Odeso.

Rimarko 2:

produktaj kostoj: 100 eŭrojn; prezo:800 eŭrojn; poŝtaj elspezoj: 50 eŭrojn. Laŭ informoj de nia membro Tamara Popova, konatino de la medalisto, estis farita nur unusola ekzemplero!

La redakcio kore dankas niajn membrojn Tamara Popova kaj Tatiana Mihno el Ukrainio.

Tipo D 1 – Unuflankaj medaloj

Centjara esperanto-jubileo en Latvio



Lando: Latvio

Kvanto: *serĉata*

Substancoj: bronzo / argilo

Pezo: *serĉata*

Mezuroj: 65 x 72 mm

Medalisto: Janis Strupulis

Jaro: 1989

Diko: *serĉata*

Averso:

ne kutima, ronda medalo kun transversa, elstaranta “banderolo” kun surskribo.

surskriboj en tri diversaj litertipoj:

LATVIO ESPERANTO 100

“*La lingvo internacia*”

Sastahdiĵis

R. Libeks

Riga, 1889

dekstre: sub la “banderolo”: la aŭtora signo de la medalisto, sen jarindiko.

Rimarko 1:

 > "Sastādījis" estas latvia vorto kiu signifas “kompilis”.

Rimarko 2:

Rudolfs Libeks (1854-1908) estis la unua esperantisto de Latvio. Pioniro, kiu en 1889 verkis la unuan lernolibron por latvoj: “*La lingvo internacia*”. Post lia formigro al Brazilo dum la 90-aj jaroj, pri Esperanto en Latvio tre longtempe oni aŭdis nenion.

Pro informoj pri la medalo ni kore dankas nian ENA-membron Aldis Bušs el Latvio.

MEDALISTOJ

20. Ateliero Holy Frères

En 1893 en St-Imier (Svisio) estis fondita artisma ateliero konata sub la nomo “Holy Frères”. La du fratoj estis respektive Francis kaj Jules Holy, ambaŭ naskiĝintaj en St-Imier. Ili komencis kiel fabrikantoj de prilaboritaj kaj gravuritaj klapkovriloj por klaphorloĝoj. Poste ili ankaŭ fabrikis medalojn kaj insignojn. En 1914 la ateliero Holy Frères gajnis oran medalon dum svisa nacia ekspozicio en Berno.



Reklamilo de la firmao



Gravurita klapkovrila skatolo en arĝento

En 1912 tiuj artistoj-komercistoj kreis por nia movado la famegajn kaj ikonajn spesmilajn pagmedalojn okaze de la 25-jara jubileo de la Unua Libro de Zamenhof. La ununuran oran 50-spessimilan ekzempleron ricevis Zamenhof en 1913 dum la UK en Berno. Ni ne forgesu, ke la sidejo de UEA tiam troviĝis ne en Roterdamo, sed en la svisa urbo Ĝenevo!




Okaze de la tiujara berna UK la firmao kreis ankaŭ la suban kongresinsignon.



Rimarko: tiujn kreaĵojn ni priskribis respektive en jk. 2 n-ro1 p.4-8 kaj aktuale en jk. 7 n-ro1 p.9

NEKROLOGO

Forpasis du neforgeseblaj esperantistoj – ambaŭ membroj de ENA!



Rudolf BURMEISTER (1930 – 2019)

La 15an de januaro 2019 forpasis nia Rudy. Do jam pasis unu jaro de la morto de la eminenta germana esperantisto-filatelisto Rudolf BURMEISTER (nask. la 19an de majo 1930, Chemnitz), kaj daŭre ni sentas lian mankon. Ne multon pri li oni parolis, kvankam lia laborado poresperanta estis elstara. Ne atendante ian ajn rekonon, li agadis senhalte, por lasi signifajn spurojn kaj valorajn informojn pri la Esperanto-movado ne nur en la filatela kampo.

Li eklernis nian lingvon en la urbo Kiel[kil], en 1947. Tre aktiva li estis tra la jardekoj en la orientgermana E-movado, estante dum pluraj jaroj prezidanto de la Esperanto-Grupo Karl-Marx-Stadt, kaj poste de la distrikta konsilio de Esperanto-organizaĵo. De 1960 li aktivadis unue kiel membro de la filatela sekcio de la Kultura Urba Asocio, iĝante baldaŭ unu el la plej kompetentaj filatelistoj. Jam ekde 1966 li komencis sian karieron kiel ekspoziciisto, partoprenante en naciaj kaj internaciaj ekspozicioj per sia eksponaĵo *La historio de Esperanto*, per kiu Rudolf Burmeister gajnis medalojn, premiojn kaj diplomojn (entute 17). Li iniciatis, kune kun la membroj de la centra poŝta konsilio, Rolf Beau (prezidanto de la poŝta sekcio) kaj d-ro Spilla Giso, multnombrajn filatelajn aktivadojn, inter kiuj publikigadon, kunlabore kun la Germana Poŝto, de specialaj tutaĵoj kaj aliaj poŝtaj artikloj.

Probable en 1966, li aliĝis al Esperanto-Ligo Filatelista (ELF), kiam la Ligo estis akceptita de la UEA-komitato kiel aliĝinta asocio. Du jarojn poste estis fondita la Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj (AREK). La du grupoj unuiĝis aŭtune de 1975 kaj havis komunan organon: *La Verda Lupeo/Fenikso*.

En 1977, kiam la informilo restis, pro diversaj kialoj, sen prizorganto, la tiama prezidanto, Ivar Paulsson, petis al Rudolf Burmeister fariĝi ties redaktoro. Ekde tiam, seninterrompe, li plenumis sian taskon ĝis sia vivofino: li aperigadis la organon po 3-4 numeroj jare, de la numero 36a ĝis la 179a (decembro 2018).

Tamen Rudolf Burmeister ne estis nur aktiva filatelisto, sed ankaŭ historiisto, ĉar estis

eldonitaj diversaj liaj publikaĵoj pri la historio de la laboristaj Esperanto-grupoj, de Esperanto-filatelito en GDR, de Esperanto en Karl-Marx-Stadt, poste en Chemnitz [kemnic] kaj en ties distrikto, de 1905 ĝis 1935 kaj de 1965 ĝis 1990. Li krome verkis plurajn artikolojn pri Esperanto kaj filatelito, kiuj estis publikigitaj en germanaj fakĵurnaloj.

Li havis multegajn kontaktojn kun aliaj esperantistoj tra la mondo, precipe kun ĉinoj, kiuj dum kelkaj jardekoj eldonadis multnombrajn stampojn, esperantlingve, pri esperantaj kaj enlandaj gravaj eventoj.

Tiom kompetenta, kiom modesta li estis: danke al lia senĉesa laborado la filatelistoj-esperantistoj – pere de *La Verda Lupeo* – estis ĉiam ĝisdatigataj pri la diversaj esperantaĵoj ĉie ajn eldonitaj. Plie li daŭre esploris, serĉante malnovajn poŝtkartojn, precipe tutaĵojn el Sovetunio kaj aliaj landoj, kaj ankaŭ glumarkojn tute nekonatajn. Do, historiisto, esploristo, filatelisto, esperantisto kaj grandkora homo.

Verkis lia samideana amikino Elda Dörfler el Trieste

* * * * *



Ludoviko Zaleski-Zamenhof salutas Marjorie Boulton dum la 100a UK en Lilo. (2015)

Louis-Christophe (Ludoviko Kristoforo) ZALESKI-ZAMENHOF (naskiĝis la 23-an de januaro 1925 en Varsovio, mortis la 9-an de oktobro 2019 en Parizo) estis doktoro-inĝeniero pri surlanda kaj enmara konstruado, aparte pri premŝtalbetono, nepo de L. L. Zamenhof. Li estis filo de Adam Zamenhof kaj Wanda Zamenhof, naskita Frenkiel; la personan nomon li ricevis honore al sia avo, Ludoviko Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto. Li estis honora membro de UEA.

Ludoviko studis en Varsovia Politekniko en 1946-49 kaj diplomiĝis kiel inĝeniero pri konstruado, sekve doktoriĝis pri teknologio de streĉbetono. En 1959 li translokiĝis al Parizo kaj daŭrigis sian profesionan karieron en Francio kaj aliaj landoj, realigante konstruaĵojn sur tero kaj maroj. Lia alia kampo de laboro estis didaktiko en la Arkitektura Altlernejo en Parizo kaj Politekniko de Milano. Li publikigis multajn artikolojn kaj librojn pri sia fako. Post la

emeritiĝo en 1993 li okupiĝis pri faka konsultado, ĉeestis sciencajn konferencojn kaj kongresojn, inkluzive de Esperanto-kongresoj. Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof edziĝis en 1949 kun Krystyna Tyszka, kiu naskis du filinojn: Hanna (1953) kaj Margaret (1958). Li havis nepinon Klementina Zamenhof-Zaruski kaj nepon Pierre-Louis-Antoine Lebard.

Li loĝis en Parizo kun la edzino Juliette, naskita Sekreka. Li parolis la francan, anglan kaj Esperanton, sed hejme la polan. Li havis la francan kaj polan civitanecojn, estis honora urbano de Bjalistoko.

En 1934 Ludoviko esprimis la deziron partopreni en la Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo. Liaj gepatroj asertis, ke partopreni en Esperanta kongreso, sen koni tiun ĉi lingvon mistrafigus la celon. La filo, helpata de siaj onkloj, Zofia Zamenhof kaj Lidia Zamenhof, entuziasme eklernis kaj ekposedis flue la lingvon internacian. Tiel komenciĝis lia nova rolo de la “eta princo” dum laŭvicaj esperantaj kongresoj. Li iĝis objekto de interesiĝo por la kongresanaro: en Stokholmo – 1934, en Romo – 1935, en Vieno – 1936 kaj en Varsovio – 1937, kie li nome de la familio Zamenhof salutis la kongresanojn. Septembre de 1939 la germanaj aviadiloj bombardis Varsovion. La domo en la Królewska-strato 41, en kiu loĝis la familio Zamenhof, estis komplete detruita. Tiam Ludoviko estis nur 14-jara knabo.

En 1987 Varsovio, kiel “lulilo de Esperanto”, estis ĝusta loko por celebri la centjaran jubileon de la Lingvo Internacia. La 72-a Universala Kongreso de Esperanto en la ĉefurbo de Pollando evidentiĝis la plej granda en la historio de la movado. Ĝi allogis sesmil (6000!) partoprenantojn, sen kalkuli proksimume unu milon da gastoj, kiuj alvenis, sen la formala aliĝo, el Sovetunio kaj el aliaj t.n. socialismaj landoj. La direktoro de UEA, Simo Milojević, sukcesis trovi en diversaj landoj de la mondo sep membrojn de la Zamenhofa familio, kiuj alvenis kiel honoraj gastoj, inter ili Louis Christophe Zaleski-Zamenhof kun la edzino Juliette. Li, kiel nepo de la iniciatinto de Esperanto, varsoviano kaj monde renoma konstruisto de “artefaritaj insuloj” sur maroj kaj oceanoj, montriĝis aparta allogo por ĵurnalistoj, sed ankaŭ por la kongresanoj.

Louis C. Zaleski-Zamenhof, reaperinte en la movado post dudekjara paŭzo, firme restis en ĝi. Li engaĝiĝis en la popularigo de la Lingvo Internacia kaj ĝia ideo per siaj intervjuoj por amaskomunikiloj. Li ankaŭ renkontiĝadis kun esperantistoj, kion respegulas la filmo aperinta en la Pola Televido s.t. “*Śladami Dziadka*” (Spuroj de la avo). En ĝi la nepo estas montrita en kelkaj lokoj, ligitaj kun lia avo Ludoviko Zamenhof.

Bjalistoko iĝis ofta vizitcelo de L.C. Zaleski-Zamenhof. En la jaro 2000 li akceptis simbolan diplomon pro la fakto, ke lia avo Ludoviko Zamenhof gajnis la unuan lokon en la referendumo pri la “Bjalistokano de la 20a jarcento”. En la jaro 2007 li estis nomita honora urbano de Bjalistoko apud 14 aliaj distingitoj, inkluzive de Józef Piłsudski kaj Lech Wałęsa. Li plurfoje vizitis Bjalistokon kiel membro de la Fondumo Zamenhof, respondeca pri la konstruo de Zamenhof-Centro.

Pli da informoj legu en la teksto de Roman Dobrzyński, aperigita en Vikipedio https://eo.wikipedia.org/wiki/Louis-Christophe_Zaleski-Zamenhof

Fonto: retejo de UEA



La Bruĝa Grupo Esperantista dum la unua mondmilito kaj poste

La milito de 1914-1918 disigis la membrojn de la BGE kaj haltigis provizore la grupan vivon. S-ro Witteryck elmigris al Hastings en Anglujo, kaj tie daŭrigis la movadon en kunlaboro kun anglaj samideanoj. Post lia reveno en 1919 estis neeble al li, pro malsano kaj parta detruo de lia presejo, repreni la prezidantecon.

F-ino Yvonne Thooris, unu el la unuaj lernantinoj de s-ro Witteryck, sekvis al li kiel prezidantino, dum s-ro **Sylvain Dervau**, fondinto-prezidanto de la Esperanto-grupo en Kaprijke [kaprajke] kaj translokita al Bruĝo kiel ricevisto de la malrektaj impostoj, helpis ŝin kiel sekretario kaj kursgvidanto. S-ro Witteryck fariĝis tiam honora prezidanto. Dank'al la laborado de tiuj ambaŭ gvidantoj la grupo konis novan progresadon kaj en 1926 ĝi povis denove festi la enskribon de sia 100a membro.

F-ino Thooris restis prezidantino ĝis 1926, kiam **s-ro Dervau** sekvis al ŝi. Tiu lasta ne povis longtempe plenumi la prezidantecon. Jam en 1929 li ekŝiĝis kiel prezidanto, favore al f-ino Thooris, kiu denove fariĝis prezidantino kaj restis tio ĝis 1946.

Fonto: "Belga Esperantisto", marto 1910 p.113-117

La originala medalo estis jam priskribita en jk. 4 n-ro1 p.4

SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ

Reuzita medalo de Rik Sauter el 1927(?)




JUBILEO BRUGA GRUPO ESPERANTISTA AL SIA HONORA
VICPREZIDANTO S^{RO}S^{YLVAIN}DERVAUX 1902 - 1932

POR SPUREMULOJ!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ malmulte aŭ preskaŭ nenion. **La parolo estas al vi!**

13a enigmo



Sufiĉe modernstila plaketo (1988) kun aspekto de stano (Sn), sed laŭ la reverse engravurita teksto (angle) farita el altkvalita arĝento, el t.n. sterlinga arĝento, tre ofte uzata por altvaloraj objektoj kaj numismatikaĵoj, ĉefe en Britio kaj en la mondvasta (iama) Brita Regno.

Ĝis nun la redakcio trovis nek indikojn nek informojn koncerne la nomon A. Shagin, nek rilate al la vorto ARTUM, sub la busto sur la aversa flanko. Ek nun, karaj gespuremuloj!!!

14a enigmo

Jen ovala, arĝentita plaketo, pri kiu ni jam havas kelkajn informojn, sed nekonata estas la pejzaĝo kun golfeto, arboj, klifoj kaj montaro. Krome kun lumturo kiel rekonebla signostango. Eble konata al francoj el la nordo aŭ al turistoj, ĉar la nomo de la probabla medalisto, A. FLINOIS, estas tre ofta familia nomo en la nordo de Francio.



TERMINARO

Alfabeto Listo (20)

Alumina bronzo: alojo de kupro kun 5-8 % da aluminio kaj foje 2 % da nikelo. Per aluminio spuroj de eluziĝo kaj korodo malkreskas. La termino "alumina bronzo" ne vere estas ĝusta. Preferinde estas "**kupro-aluminio**", sed tiu termino estas malofte uzata en la ĝenerala numismatiko. En Italio ĝi estas nomata "**bronzitalo**" el la vortoj bronzo kaj italiano. La moneroj de 500 liroj, emisiitaj en 1982 en Italio, San-Marino kaj Vatikanurbo havas kernon de bronzitalo kaj ringon en rustimuna ŝtalo.

Argentiumo: sterlinga arĝenta alojo konsistanta el 92,50 % da arĝento (Ar) kaj 7,50 % da germaniumo (Ge). Arĝento kun germaniumo ne nigriĝas pro korodado, ĝi do konservadas belegan, blankan brilon.

Brunigi: meti brunan surfacan tavolon sur metaloj. Celata estas doni al medaloj belegan, malhelan, malbril-brilan surfacan tavolon. Tiucele la metalo, plej ofte kupro aŭ kupra alojo, alterne estas trempata en acidon kaj en sulfidan solvaĵon. Post tralavado kaj sekigado la malhela tavolo sur la elstarantaj partoj estas forigata per frotado kaj polurado, por akiri belan aspekton. Fine ĝi estas ŝirmata per laktavolo.

Dolorkompensa mono: financa kompensaĵo pro (ne)korpaj sekvoj de malbona evento.

Ĝirmono: sumo por endosi.

Kluzmono: mono pagenda por (mal)fermigi kluzon.

Ludmono: oferta sumo dum ludo.

Maldungomono: eksiga financa kompensaĵo.

Senmonigi: forpreni la kompletan kapitalon de iu.

Sfragistiko: vidu "sigelografio"-n.

Sigelografio: helpa scienco de la historio, afina al la numismatiko, kiu pristudas sigelojn, uzatajn por konfirmi la originalecon kaj kvaliton de varoj.

Ŝtatmono: fonduso, kaskupono aŭ ŝtataj financoj / rimedoj.

Sterlingo: plej alta titro de arĝento en alojo kun kupro (925/1000). Do: arĝento = 92,50 %, kupro = 7,50 %.

Tagmono: unutaga salajro, tagpago.

Trinkmono: bakŝiŝo.

Varbomono: dunga premio, varbopremio.

ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Plumbosigeloj kaj aliaj sigeliloj (1)

La **sigelografio** unuflanke kaj la faleristiko kaj la numismatiko aliflanke, estas intense afinaj; la komunaj eco kaj origino de sigeloj kaj moneroj/medaloj estas la klasika metodo, laŭ kiu el metalbendoj per uzo de tondilo estis tranĉataj disketoj. Tio okazis sammaniere por moner- kaj por sigelstampoj. Tial tiamaj kolektantoj plejofte kolektis samtempe monerojn, medalojn kaj sigelojn. La uzo de sigeloj komenciĝis verŝajne en Mez-Oriento (probable unue en Mezopotamio), do kvar jarcentojn antaŭ nia erao! (redakcia enkonduko)

Fonto: "Encyclopedie van Munten en Bankbiljetten", Samson Uitgeverij Alphen aan den Rijn 1986

Verkis: Raf Van Laere

A) Enkonduko (de la aŭtoro)

Ĝis nelonge antaŭe sigeloj troviĝis en preskaŭ ĉiuj loĝejoj, ekzemple sur hidro- kaj amperometro, etaj plumbaj disketoj kun unuflanke aŭ ambaŭflanke kelkaj literoj aŭ ciferoj. Ili malhelpu la misuzon de tiaj aparatoj.



Metra sigelo

Antaŭ kelkaj jardekoj sigeloj estis uzataj ankaŭ por sigeli diversspecajn pakumojn, kiel sakojn kun faruno, greno, sterkaĵoj ktp. Plumbaj sigeloj ja garantiis la kvaliton de la varoj. Tiaj sigeloj antaŭ nelonge estis uzataj ankaŭ de diversaj publikaj servoj kiel la doganistaro, por konfirmi, ke la laŭleĝaj-ofte fiskaj-taksoj estis pagitaj.



Dogana sigelo

Lastatempe tiuj plumbosigeloj estas anstataŭigataj per aliaj sistemoj; plumbo estas ja malĉipa, foje eĉ toksa metalo. Samtempe evoluis la teknologiaj metodoj por garanti la kvaliton de varoj. Tial la graveco de plumbaj sigeloj plimalgrandiĝis, kaj ili ofte malaperis en la nebuloj de la forgeso, bedaŭrinde ofte antaŭ ol sciencistoj havis la okazon studi la diversajn aspektojn de la tradicia sistemo.

Tamen, dum la pasinta jaro en sciencistaj rondoj la intereso denove kreskis, ĉar uzantoj de metaldetektiloj regule retrovas tiajn sigelojn kaj demandas sin, kiel identigi, dati kaj konservi ilin. Krome kreskas la scivolemo pri la iama aplikado.

Pasis preskaŭ unu jarcento post la eldono de la unua ĝenerala verko pri plumbaj sigeloj far Antoine Sabatier¹, antaŭ ol dua sufiĉe ĝenerala verko aperis, verkita de Geoff Egan², sekve grandparte anstataŭigita de publikaĵo far Stuart Elton³. Mia propra verko tiurilate priskribas preskaŭ 900 plumbajn sigelojn kaj alitipajn sigelojn de la 15a ĝis la 18a jarcentoj⁴. Aperis dum la lastaj jaroj diversaj monografioj kiel tiu de Daniel Slowik, kiu publikigis artikolojn pri

¹*Sigillographie historique des administrations fiscales, communautés ouvrières et institutions diverses ayant employé des sceaux de plomb (XIVe-XVIIIe siècles)*, Paris 1912.

²*Lead cloth seals and related items in the British Museum*, London 1994 (= *British Museum occasional papers* 93).

³*Cloth seals. An illustrated reference guide to the identification of lead seals attached to cloth: from the British perspective*, Oxford 2017.

⁴*Loden zegels en verzegelingen. Eerste hulp bij identificatie met voorbeelden uit België, Nederland, Duitsland, Frankrijk, Groot-Brittannië, Polen en Spanje (15de-18de eeuw)*, Wijer & Voorburg 2019.

unuopaj francaj urboj kiel Dieppe [djep] (2018), Lyon [lion] (sen jarindiko), Nimes [nim] (2016) kaj Rouen [ruan] (2017).

Aliuloj, kiel John Sullivan⁵ kaj Carsten Spindler⁶, havas proprajn pritemajn preferojn. Tamen, plejofte publikaĵoj pri mezepokaj kaj modernaj plumbaj sigeloj estas nesciencaj kontribuaj, publikigitaj en diversspecaj revuoj.

Multaj novaĵoj troviĝas en Interreto, sed ne estas garantio pri korekteco kaj scienca metodo. Esceptoj estas la brita “Portable Antiquities Scheme” kaj la nederlanda parulo “Portable Antiquities Netherlands”. Tamen, ne ĉiuj registaraj arkeologiaj iniciativoj estas kvalite sufiĉe altnivelaj koncerne plumbajn sigelojn .

B) Diversaj tipoj de plumbosigeloj

1. **Dutrueta plumbosigelo** (angle: bag seal; france: plomb à tunnel; germane: Lochplombe)

Jam ne estas tute klare, kie kaj kiam sigeloj estis unue uzataj. Tamen, dum la Romia Regno la uzado estis tute kutima kaj por dokumentoj kaj por varoj. Romiaj sigeloj plejofte estis trapikataj, tiel ke ili povis esti firmligataj per ŝnureto. Tiun tipon oni nomas “dutrueta sigelo”, surbaze de la trutoj, tra kiuj la firmliga ŝnureto en- kaj eliras tra la sigelo. Tiu tipo jam delonge ekzistas, ĉar ĝis hodiaŭ ĝi estas uzata ekzemple por sigeli dokumentojn.



Bizanciaj dutruetaj plumbosigeloj estas ofte trovataj en la baltaj ŝtatoj, en Malgranda Azio kaj en Mez-Oriento. Ĉie, kie la Bizanca Regno influis aliajn kulturojn dum multaj jarcentoj, tiu tipo estis uzata, kiel montras rusaj sigeloj ĝis la fino de la 19a jarcento, sed ankaŭ fatimidaj kaj aliaj mezepokaj arabaj sigeloj. En okcidenta Eŭropo romiaj kaj bizancaj sigeloj estis ekzemploj por papaj kaj aliaj buleoj; ofte ili estas trovataj dum elfosado.

Ekde de la romia epoko dutruetaj plumbosigeloj estis aplikataj ne nur por sigeli dokumentojn, sed ankaŭ varojn kaj aliajn objektojn. En la Bizanca Regno tiu tradicio persistis. Unu el tiuj kategorioj estas la eta dutrueta plumbosigelo, aplikata dum la 11a kaj 12a jarcentoj en Rusio, por plivalorigi kaj uzi kastorfelojn kiel pagilojn.

Dutruetaj sigeloj tamen ne estas sekuraj. Filertuloj kapablas malfermi kaj reuzi ilin. Dum la mezepoko pli sekuraj sistemoj estis elpensataj laŭ du sistemoj: unuflanke oni daŭrigis la uzon de malsuprenpendaj sigeloj, firmligataj per ŝnureto, aliflanke oni kreis tute novajn tipojn kiel tub- kaj ĉarnirsigelojn, kiuj estis fiksataj rekte al la produktoj.

⁵Russian cloth seals in Britain. Trade, textiles and origins, Oxford & Oakville 2012.

⁶Bleiplomben aus Braunschweiger Funden, Braunschweig 2005.

En la daŭro de la jarcentoj oni krome provis igi dutruetajn sigelojn “pli sekuraj”. Provizore ni ne scias, kie aŭ kiam tio okazis. Ekde 1737 en Francio mallongtempe estis uzata por du- kaj kvartruetaj sigeloj tute alia sekuriga sistemo: je la nivelo de la radiusa kanaletoj estis farata trueto. Kiam la ligila ŝnureto estis tratirata, la trueto estis fermata per eta plumba keĵlo. Ŝajnas, ke la pli uzata tiama metodo estis meti centran stifton en la radiusan kanaleton. Apenaŭ eblus reuzi tiajn sigelojn.

Se tuj antaŭ la sigelado la “blanko” (= la ankoraŭ neuzita sigelo) estas turnata kelkefoje, la ŝnureto, per kiu estas fiksata la sigelo, ne plu povas esti forigata sen damaĝi la sigelon. Produkti blankon kun centra sekuriga stifto tamen ne estas sinekuro. El la epokoj antaŭ la 18a kaj la 19a jarcentoj jam ne estis trovita ununura ekzemplero, almenaŭ laŭ mia sperto.

Por certaj sigeloj estis elpensata alia solvo. La trapiko ne sekvis la diametron de la sigelo rekte, sed sekvis angulon, tiel ke forigo de la ŝnureto iĝus malpli facila. Tamen ankaŭ estis probable malfacile fari tian tipon grandskale, kaj la nuraj ekzempleroj konataj al mi datas el la 18a jarcento kaj estis realigitaj de la centra prusa (nord-germana) instanco.

Alia metodo por sekurigi dutruetan sigelon estas fari ne unu sed du trapikojn, tiel ke estiĝas kvartrueta sigelo. Tiuj trapikoj povas esti paralelaj aŭ povas kruci sin laŭ 90-grada angulo. Kvartruetaj sigeloj kun paralelaj trapikoj ne vere estas pli sekuraj ol dutruetaj ekzempleroj, sed tiuj lastaj estas relative pli facile fareblaj. Ekde la mezepoko ili estis aplikataj sporade, sed ili ne iĝis popularaj, krom en la rondo de la doganaro de la aŭstria Habsburgoj, kiuj ofte uzis tiajn sigelojn en la Sudaj Nederlandoj dum la dua parto de la 18a jarcento.

La varianto kun krucantaj trapikoj estis aplikata en la sama epoko, sed al mi estas konataj nur ekzempleroj de la 15a jarcento, devenaj el brabantaj tekstilcentroj kiel Mehelno (Belgio) kaj Matriĥto (Nederlando).

2. Tritrueta plumbosigelo



Tritrueta plumbosigelo. Blanko el la 19a-20a jarcentoj; Ø 30 mm. Belga trovaĵo.

En la daŭro de la 18a jarcento – mi ne konas ekzemplojn el aliaj epokoj – ekiĝis tritruetaj plumbosigeloj, kiuj ebligis meti du ŝnuretojn tra unuopajn truetojn kaj sekve eksterenigi ilin kune tra nur unu trueton. Estas ege malfacile malfermi kaj reuzi tritruetajn sigelojn. Eble ili unue aperis en Francio, sed baldaŭ ankaŭ en la vasta eŭropa kontinento. Dum la 19a jarcento la tritrueta tipo anstataŭigis ĉiujn aliajn tipojn. Ĝis la fino de la 20a jarcento tiuj sigeloj senĉese estis la plej uzataj en la tuta mondo. Eĉ nun ili estas trovataj en multaj domoj, fiksataj al hidro- kaj amperometroj, al sakoj de faruno, sterkaĵo, brutfuraĝo ktp.

Nur je la fino de la 20a jarcento pro ekonomiaj (plumbo estas relative multekosta) kaj ekologiaj (plumbo estas toksa, peza metalo) kialoj, ili estis anstataŭigitaj per pli ĉipaj sigeloj el artefaritaj substancoj.

Daŭrigota

HISTORIAJ ASPEKTOJ

Esperanta numismatiko en uniformo (4)

C. Malagrabra sed necesa historia ekskurso

1. Kiel la usona armeo misuzis la lingvojn de minoritatoj

Nuntempe la termino “kodoparolanto” ofte estas asociata al diversaj indiĝenaj popoloj. En Usono la armeo, komforte “fororgesanta”, ke pro la iama celkonscia genocido de la indianoj (*longtempe estis gajnindaj diversvaloraj “premioj” kiel rekompenco por mortigo de indianaj viroj, virinoj, eĉ infanoj!*) apenaŭ survivis kelkdekaj tribanoj, kiuj ankoraŭ scipovas la lingvon de la pragepatroj, la armeaj estraroj dungis dum la du mondmilitoj indianojn, por servi ilin kiel komunikulojn inter la taĉmentoj.



Dum la dua milito *Uncle Sam* (mis)uzis “dunganojn” de diversaj triboj, sed ĉefe de la navaĥa gento, ĉar ilia nur parolata lingvo estas ege komplika, kaj tial la japanoj fakte neniam sukcesis kraki la kodojn. La plimulto de la (transvivintaj) indiĝenaj veteranoj devis tamen atendi ĝis la jaro 1968 por ricevi iun ateston de rekono!

Fontoj: - Wikipedia

- Youtube>usona filmo (2002) “Windtalkers”, pri du blankaj usonaj militistoj, kiuj devas akompani, protekti kaj se necese mortigi du navaĥajn indianojn.

2. Kiel la sama armeo misuzis la lingvon de paco de alia minoritato

Dum la 50aj kaj 60aj jaroj de la antaŭa jarcento la usona armeo organizis militajn ekzercojn kontraŭ imaga malamiko, tutsimple nomata Agresor (agresanto). La ecoj de Agresor estis definitaj tre detale. Soldatoj en la rolo de Agresor devis lerni la imagan hierarkion kaj la tipojn de armiloj, uzataj de Agresor. Aliuloj devis paroli alian lingvon (ol la anglan), kaj tiu lingvo – ironie kaj samtempe kruele, estis Esperanto, la lingvo de paco...



Kial kaj kiel Esperanto do iĝis (kiel anoncas la titolo de la armea kompendio “The Agresor Language”) la lingvo de la agresantoj? Nu, ĉar Esperanto estis *ja-escepte rilate al la mesaĝo pri paco!*-la perfekta ilo por la celoj de la armeo! La usonanoj (prave!) konsideris Esperanton kiel “vivantan kaj validan internacian skribatan kaj parolatan komunikilon kun riĉa vortprovizo”. Krome ĝi estas regula kaj facile lernebla, almenaŭ por uzi ĝin dum militista ekzerco, kaj nepre taŭga kiel neŭtrala aŭ internacia identigilo en la “filozofio” de Agresor. Uzi la rusan aŭ la hispanan estus politike tro delikate, krei novan lingvon tro postuleme. Esperanto ne nur estis neŭtrala kaj facila, sed ...tutsimple disponebla!



Tamen, la historio montras, kiel kaj kiom Esperanto kaj Esperantujo devis suferi antaŭ ol akiri tian “laŭdon”! La historio de Esperanto estas severe markita per militoj. La ege amata frato de Zamenhof mortigis sin, kiam la rusoj ordonis al li partopreni en la unua mondmilito, ĉar li ne povis toleri la



person, denove travivi tion, kion li estis vidinta kaj spertinta kiel arma kuracisto dum la rusa-japana milito. Ludoviko mem baldaŭ mortis, post kiam li aŭdis novaĵojn pri la ruinigoj en ĉiuj partoj de Eŭropo. Liaj infanoj tamen postvivis, sed bedaŭrinde nur por pereji en la koncentrejoj dum la sekvonta milito. Esperantistoj ĝenerale estis persekutataj de la hitleranoj, ĉar la “Führer” konsideris la internacian lingvon kiel ilon de juda konspiro, kaj ili aliflanke estis mortigitaj aŭ senditaj al la gulago laŭ ordono de Stalino, konsideranta la lingvon kiel danĝeran insignon de kosmopolitismo.

Tamen Esperanto travivis, domaĝe malpli forta, sed ĝiaj pacaj idealoj restis sendifektaj, malgraŭ la konstato kaj agnosko, ke la kruelaj eventoj de la pasinta epoko ŝajnis tiujn idealojn naivaj.

Nu, en la fifama kompendio de Agresor troviĝas konciza priskribo de la esperanto gramatiko, kiel en normala lernolibro, sekvata de vortareto kun t.n. utilaj terminoj, kiu tamen aspektas kiel la benigna revo de Zamenhof, reflektita koŝmare en la tordita spegulo de la malbono. Malsame kiel normalaj lernolibraj vortrezoroj, ĝi ne inkludas bazajn vortojn kiel “infano” aŭ “amo”, sed fivortojn kiel:



kirasportilo, bombarda proksimigo, larmagaso, malobeo, pikildrato, pafpovo, pikegi, pugnobati, linĉi, sufoki, ŝtrafi, tranĉi, veneni, torturi, mortigi...



Tiajn vortojn oni nur uzas, kiam oni rolas kiel malamiko en militludo. Estis do kvazaŭ testamento de la fleksiĝemo kaj la produktiveco de Esperanto, ke la armeo kapablis krei terminojn kiel *senresalta pafilo*, kiu neniam antaŭe estis uzata de iu ajn esperantisto. Probable neniu esperantisto iam imagis, ke ordonoj, bojataj en Esperanto, kaŭzus en iu viro la senton, ke la malamiko, kiun lia menso portretis, malsamus usonan soldaton.

Por esperantistoj la lingvo ĉiam estis ilo por montri egalecon anstataŭ malsamecon, kaj tiu sento foje montriĝis dum apenaŭ imageblaj

eventoj, kreitaj de veraj agresantoj dum veraj militoj. Post la okupado de Nederlando, fine de la dua milito, iu esperantisto singarde kontrolis domon en Arnhem, en kiu la loka klubo kutime kunvenis, kaj li trovis skribitan mesaĝon sur la fermata pordo, postlasitan de germana soldato, informante en Esperanto: “La domo estas senhoma. Ĉiu vizitanto povas eniri. Ĉu forta voko ne plu iros tra la mondo? Estu kuraĝaj, baldaŭ venos alia epoko. Vivu Esperanto!”



Verkis: Arika Okrent (27a de marto 2013)

Elangligis: Bert

Fontoj: Kanhaya Lal Gauba: “Uncle Sham” 1928 / Ulrich Linz: “La danĝera lingvo” 1988 / Arika Okrent: “In the Land of invented Languages” 2009.]

Ĉu oni reviziu la spesmilon?

Terry Watts

La spesmilo reviziata (5)

En la antaŭaj kvar artikoloj mi traktis diversajn aspektojn de la spesmilo kaj ties eventuala revivigo, sed ne detale esploris la kialojn, pro kiuj or-bazita mono estas bona afero. Kaj al tio mi min nun turnas.

Se vi rigardos en la ĵurnalo, por vidi la prezon de oro en via valuto, vi trovos certan ciferon, kaj tio probable estos la prezo por unu troja unco da oro. Ĉar per tiu mezuro oni kutime citas la prezon de diversaj noblaj metaloj, kiel oro, arĝento, plateno ktp.

Troja (aŭ fajn-) unco pezas 31,1035 gramojn, kio donas la prezon por oro en spesmiloj de sm 42,4795 – kalkulita per la formulo $31,1035/0,7322$ (rilatumo inter du pezoj).

Kvankam la prezo de oro, esprimita en spesmiloj, necese ĉiam estas la sama, vi certe konscius, ke la prezo de oro en via valuto ne estas konstanta. Tiel vi eble vin demandas kial or-bazita mono havas sencon.

Nu, ni metu flanken por la momento, ke en la epoko kiam la spesmilo estis lanĉita, estis tute normale en multaj landoj ligi la valoron de la loka valuto al certa pezo da oro, kaj ke tiu sistemo bone funkciis, kaj ni esploru certajn trajtojn de oro.

Oro tute diferencas de multaj aliaj krud-varoj kiel petrolo, tritiko, fero ktp en tio, ke ĝi ne estas konsumata, nek dum stokado detruigatas per forbrulo, putriĝo aŭ korodo. Efektive, preskaŭ ĉiu unco da oro, kiam ajn elterigita, ekzistas ankoraŭ, kaj ĉiujare la tuta super-tera stoko en la mondo kreskas – sed tre malrapide (eble je inter 1% kaj 2%).

Pro tiu stoko kaj la internacieco de la or-merkato ne verŝajna estas iu **tutmonda** subita saltego supren en la prezo de oro, kiu ne post iom korektiĝos. (Tamen la loĝantoj de iu specifa lando povas tion sperti, se la internacia valoro de ties valuto subite plonĝas, aŭ tia falo estas anticipata.)

Aliflanke, same estas ne verŝajna subita **tutmonda** falego en la prezo de oro, ĉar jam delonge oro estas taksata kiel sekura ŝpar-rimedo, liveranta protekton kontraŭ ekonomiaj ŝokoj kaj la kapricaj mon-manipuloj de registaroj.

Tial prez-faloj faras oron pli aĉetinda kaj provokas pli da aĉetoj far ŝparemuloj, kaj tiuj kiuj volas konservi sian riĉon. Cetere, tiuj lastaj plinombriĝis kun la kresko de la monda loĝantaro kaj estas pli riĉaj pro la ĝenerala pliprospiriĝo.

Plue oni devus noti, ke la kostoj de orminado kreskas en la loka valuto kun la perdo en la valoro de tiu konvencia (papera) mono. En periodoj de ĝenerala inflacio la elterigo de oro en la minejoj ĉesus, se la prezo de oro en konvencia mono **ne** samtempe kreskus.

Aliflanke saltoj en la prezo de oro pligrandigas la minindajn rezervojn de la orminejo, kaj tio povas konduki al pli da produktado kaj kresko de la supertera stoko da oro (sed malrapide).

Do klare estas oponentaj faktoroj, kiuj influas la prezon de oro. Kio estas la neta rezulto? Ĉu oro estas stabila mezurilo de valoro? Aŭ ĉu ĝi eĉ ĉiam estas destinata al konstanta kreskigo (aŭ malkreskigo) de la valoro de via ŝparo?

Antaŭ ol doni la respondon, mi devas konsciigi vin, pri kion signifas ŝanĝo en la papermona prezo de iu varo. Vi ne povas taksi tion, sen distingi inter la ŝanĝo en la valoro de la papermono kaj ŝanĝo en la prezo de la varo pro ŝanĝoj en produkto-metodo aŭ teĥnologio aŭ laborkostoj ktp.

Cetere oni ricevas tute alian bildon de la stabileco de prezoj en or-bazita valuto depende de la koncerna periodo.

La prezo de pajnto da lakto en nacia mono de unu semajno al alia semajno povas esti senŝanĝa, dum la prezo en or-mono ne estus konstanta. Escepto ĉi tie estus, se en via lando vi spertas hiperinflacion. Aliflanke la prezo de io, esprimata en iu or-bazita mono, povas esti surprize simila post la forpaso de 100 jaroj, kiel ni jam vidis en la unua artiklo en ĉi tiu serio.

Sed se oro ne estas efika mezurilo, per kiu oni povas taksi la valorigon aŭ senvalorigon de konvenciaj valutoj, kiu alia kandidato por tiu rolo pli taŭgas? Eble vi estas tentata proponi arĝenton?

Certe estis periodoj en la historio, dum kiuj la mono estis en diversaj landoj bazita je arĝento. Sed pratempe la rilatumo or-prezo/arĝento-prezo estis pli konstanta. Aparte dum la lastaj 50 jaroj (do en la erao de flosantaj valutoj) la uncoj da arĝento, bezonataj por aĉeti unu uncon da oro, tute ne estis konstanta sumo.

Tamen, eble malgraŭ tio, vi volus argumenti por arĝenta bazo por Esperanta mono, ĉar tio faciligos la produktadon de moneroj kun reala valoro. Ni povas esplori tion per eta pens-eksperimento.

Supozu, ke en 1965, kiam unue elstampiĝis stelo-monero el arĝento, oni estus traktinta tiun moneron ne kiel ĵetonon sed kiel havantan realan valoron egalan al ĝia nominala valoro.

Tiel estintus du Esperanto-monoj, la stelo bazita je arĝento kaj la tradicia spesmilo bazita je oro.

Plue supozu, ke mi pruntis de amiko en 1965 25 stelojn, sed, ĉar mi estas tradiciemulo, mi kalkulis kaj notis tiun ŝuldon ankaŭ en spesmila ekvivalento (tio estas en or-ekvivalento).

Pasis multaj jaroj, kaj nur hodiaŭ mi decidis repagi ĝin (en eŭroj). Sed kiom repagi ? Kiel kalkuli?

La 25-stela monero enhavis 22.5 g (aŭ 0,7234 uncojn) da pura arĝento. Hodiaŭ la prezo de arĝento estas €13,45 por unco. Do hodiaŭ **25 steloj = 0,7234*13,45 = €9,73 (1 stelo= 38,9 cendojn)**.

Tamen en 1965 unco da arĝento kostis \$1,29, kaj unco da oro kostis \$35. Do uzante en 1965 25-stelan moneron, por aĉeti oron, oni estus ricevinta $(0,7234*1,29)/35 = 0,0267$ uncojn da oro. Sed la hodiaŭa prezo da oro estas, €1080. Do **25 steloj = 0,0267*1080 = €28.83**.

Kiu sumo pli respiegulas la intervenan inflacion? Kiu estus pli justa¹? Kiu kurzo por la stelo pli proksimas al la 1942-a kurzo, 1 stelo = kosto de ordinara pano en Nederlando?

Evidente, debitoroj preferus ŝuldojn en mono arĝent-bazita, kreditoroj en la or-bazita spesmilo.

¹Se mi decidus uzi la kurzon por la stelo, 1 stelo = 0,25 guldenojn, kaj ĉar, en 1965 3.6 guldenoj = 1 dolaron, kaj hodiaŭ 1 dolaro = 0,81 eŭrojn. Mi repagus $[(25*0,25)/3.6] * 0,81 = €1.41$ eŭrojn (1 stelo = 5.64 cendojn).

F I N O

Tutkore ni dankas la aŭtoron Terry Watts pro lia ĝisfunda kaj fakula esearo

+++++

Reĝustigo... aŭ kiel diris la romianoj: “Errare humanum est!”

En numero kvar de la sesa jarkolekto (minimume?) du eraroj estu korektendaj.

Unue, dank'al la atenta legado de s-ino Anna Bartek, membro de la 50-jara Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo, ni nun konscias kaj memoros, ke la 100a UK en Lilo disvolviĝis en 2015, NE en 2017 (vidu jk. 6, n-ro 4, p. 11 sube).

Ni ankaŭ mem malkovris (tro malfrue!), ke “verŝfandita” ne ekzistas. La korekta termino estas “fandverŝita” .

Ni pardonpetas, ĉar “Humani nihil alienum” kaj ni kore dankas s-inon Bartek!

La redakcio

VIENA ESPERANTO-MUZEO – 90-JARA




Solena inaŭguro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno la 1-an de aŭgusto 1929.

Por soleni la 90-jariĝon de la unika muzeo en Vieno oni aranĝis simpozion pri planlingvoj kaj lingvoplanado. Ĉiuj prelegoj estis en la angla, sed dum la paŭzoj kaj ankaŭ dum la diskutoj post la prelegoj ankaŭ Esperanto estis uzata.

La Esperanto-muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko festis sian 90-jaran jubileon per internacia simpozio pri planlingvoj kaj lingvoplanado. En 1929 okazis la solena inaŭguro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Ekde tiam oni ĉiujare informas kaj surprizas milojn da vizitantoj el la tuta mondo per la fascino de Esperanto. Dum la pasintaj kvin jaroj la Esperanto-muzeo bonvenigis pli ol 85 000 gastojn.

Kiam la Esperanto-muzeo estis oficiale inaŭgurita, la 1-an de aŭgusto 1929 en la pompa salono de la Nacia Biblioteko, ĝi estis unu el la unuaj lingvo-muzeoj en la mondo. Ĝia establo



estis kaj sekvo de pligrandiĝanta intereso pri Esperanto post la unua mondmilito kaj rezulto de kreskanta bezono de centra internacia Esperanto-biblioteko por la multnombraj publikaĵoj kiuj aperis ekde 1887. Du personoj estis aparte gravaj por la fando: Felikso Zamenhof (1868–1933), kiu havis la ideon por tia biblioteko, kaj Hugo Steiner (1878–1969), kiu tuj transprenis la impulson kaj fondis la Esperanto-muzeon en Vieno.

Por festi la 90-an naskiĝjaron la Aŭstria Nacia Biblioteko kun subteno de Esperantic Studies Foundation (ESF) invitis la 24-an kaj 25-an de oktobro 2019 en Palais Mollard al internacia scienca simpozio pri la temo “Planlingvoj kaj lingvo-planado”. La jubileo de la Esperanto-muzeo donis bonvenan okazon por

retrorigardo al ĝia facetoriĉa historio, por superrigardo pri ĝiaj nuntempaj projektoj kaj precipe por diversaj prezentadoj en la vastaj esplorkampoj de lingvo-muzeoj, planlingvoj kaj lingvo-planado.

Kadre de ok temgrupoj dek ses fakuloj prezentis siajn esplorojn kaj publikaĵojn, kiuj ankaŭ spegulas la havaĵon de la Esperanto-muzeo. Kaj la [programo](#) kaj la [resumoj](#) de la simpozio rete legeblas. La unua tago, dum kiu prelegis interalie Sabine Fiedler, Klaus Schubert kaj Michael Gordin, estis dediĉita al la temoj “lingvo-muzeoj”, “planlingvoj”, “lingvo-planado” kaj “lingvo-planado kaj planlingvoj – biografioj”. La duan tagon sekvis la temaroj “Esperanto – originoj”, “Esperanto – biografioj”, “Esperanto – esplorprojektoj” kaj “Esperanto en la 21-a jarcento – lingvo kaj tutmondiĝo”, dum kiuj interalie Humphrey Tonkin, Federico Gobbo kaj Seán Ó Riain donis prezentadojn.

La simpozion, kiu estis ege internacia, partoprenis ĉirkaŭ 50 personoj el pli ol 15 landoj. Kvankam ĉiuj prelegoj estis en la angla, dum la paŭzoj kaj ankaŭ dum la diskutoj post la prelegoj aliaj lingvoj, precipe Esperanto, estis uzataj. La reagoj al la simpozio estis ege pozitivaj. Multaj personoj demandis, ĉu la prelegoj estos publikigitaj kaj kiam la venonta simpozio okazos en la Esperantomuzeo en Vieno.

Bernhard Tuider



Kelkaj numismatikaĵoj el la kolekto de la Esperanto-muzeo en Vieno

RETPOŜTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

08.10.2019 16:25

Kara Jozefo!

Lastfoje en 2019 mi petas provlegi la kvaran numeron de la jaro. Kiel kutime mi esperas, ke via laboro ne daŭros tro longtempe.

Mi jam nun antaŭdankas vin amike kaj samtempe deziras tutkore al vi kaj al via familio multan feliĉon en la jaro 2020.

Amike kaj numismate

Bert

11.10.2019 16:52

Kara Bert,

jen ĉi-kune nia revuo kun miaj sugestoj.

Kaj jen kelkaj kromaj rimarkigoj miaj pri oftaj kaj ripetiĝantaj eraroj:

1) Se vi uzas ĉi + substantivo en kunigita adverba formo, uzu post 'ĉi' streketon, ekz. en ĉi tiu momento > ĉi-momente.

2) Akordigo de subjekto kun postmetita epiteto: ekz. por serĉi la ordenojn, monerojn, medalojn kaj aliajn historiajn memoraĵojn, iam donacitajn al Ludoviko.

3) 'ne jam' povas signifi a) ne plu kaj b) ankoraŭ ne. Do estas pli simple skribi ne plu aŭ ankoraŭ ne.

4) 'Korekta' signifas ripara, pliboniga, reboniga. Ne konsilindas uzi ĝin anstataŭ 'ĝusta'. La baza vorto estas ja 'korekti'.

5) La esperanta ortografio estas sufiĉe nedifinita, tamen konsilindas meti komon inter propoziciojn, por unusence apartigi la sencounuojn de frazo.

6) Skribu aŭ 'fare de' iu (oficiala) aŭ 'far' iu (neoficiala), sed neniel 'far de' iu!

Kara Bert, dankon por viaj novjaraj bondeziroj, mi same deziras al vi ĉion bonan por la nova jaro, precipe la plimultiĝon de la legantaro de ENA!

Amike: Jozefo



15.10.2019 18:30

Kara amiko Walter!

Mi denove ĝojas pro viaj sukcesoj en aŭkcioj, ĉar tiel alproksimiĝas la nova celo de via projekto. Mi denove esperas pri bela novaĵo memore al Julia Isbrücker! Mi jam mendas kvar (4) ekzemplerojn!

Baldaŭ mi forsendos la lastan numeron de la sesa jarkolekto de "Esperanta Numismatiko".

Amike kaj numismate,

Bert

15.10.2019 18:38

Kara Bert!

Dankon!

Baldaŭ mi preparolos la detalojn kun Münze Österreich, poste mi scios la prezon por „50 Steloj“.

<https://www.muenzeoesterreich.at/service/b2b-dienstleistungen/ihr-bedarf>

Numismate salutas Walter

20.10.2019 9:28

Kara Bert!

Refoje dankon pro 6/4. Jen demandoj:

Paĝo 10, supre: Ĉu “verŝfandita” estas sinonimo por “gisita” aŭ “muldita”?

Mi ne povis trovi la diferencon inter “gisi” kaj “muldi”. Eble tasko por terminaristo.

Paĝo 15: Ĉu “baza metalo” estas “nenobla”?

La prononco de Chemnitz (paĝo 22, sube) estas [kemnic] (ne [ĥemnic]).

<https://de.wikipedia.org/wiki/Chemnitz>

Elkoran saluton el Vieno de

Walter

21.10.2019 15:33

Kara Walter!

*Dank' al via demando mi kontrolis en PIV kaj montriĝas, ke mi faris eraron. PIV ne mencias verŝfandi, sed nur **FANDVERŜI**= "fluigi fanditan likvan metalon en muldilon" (p.1226)*

La diferenco inter “gisi” kaj “muldi” troveblas sur la paĝoj 394 (gisi= fandi, pp produktado de giso) kaj 763 (muldi= reprodukti objekton, enpremante moligitan materialon en ujon, kiu havas la deziratan formon, aŭ prepari tiun proceson).

Baza metalo fakte estas nenobla metalo.

Ĉu la prononco en la germana vere estas kemnic? Do, mi korektos! Dankon Walter!

Amike kaj numismate,

Bert

24.10.2019 11:16

Kara Bert!

Mi kunsendas La Bulteneton 45 (provizora versio) kun mencio de ENA sur paĝo 15.

Ĉu en ordo?

Salutas Walter

24.10.2019 20:13

Kara Walter!

Dum la lasta semajno mia komputilo estis kaduka pro virusa atako, sed nun denove kiel nova, almenaŭ laŭ la komercisto.

Multan dankon pro la freŝa Bulteneto, kiu aspektas alloga pro la multkoloraj bildoj kaj pro la efikaj komentoj. Specialan dankon pro la publikigo de la ENA-varbilo!

Amike kaj numismate,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

19.10.2019 16:03

Dankon amiko. Trafoliuminte ĝin mi trovis multon interesan. Mi sugestis al mia amiko numismato Qerim Vrioni verki ion por via revuo.

Ĝis,

Bardhyl

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

19.10.2019 21:14

dankon pro la ĉiam pli interesa revuo.

amike

renato corsetti



20.10.2019 10:20

Mi iomete rigardis la senditan numismatikan revueton.... tre bela.... tre luksa...

Interesa listo.... mi devas foje kontroli ĉu la vortoj troviĝas en mia vortaro!

Kore,

Petro Desmedt

21.10.2019 14:57

Kara Petro!

Multan dankon pro via pozitiva reago koncerne nian revuon. Aliĝo estas tute senkosta.

Amike kaj numismate,

Bert

20.10.2019 12:16

Mi konsilas ke vi en via vortareto aldonu (precipe se ili ekzistas ekz en piv) ekzemplajn frazojn. Vidu: kasmono en PIV.

PETRO

21.10.2019 14:53

Kara Petro!

Multan dankon pro viaj konsiloj kaj sugestoj. Mi supozas ke nia venonta interparolado (eble dum la Zamenhoffesto en Antverpeno?) povus esti fruktodona por la iama eldono de numismatika terminaro.

Amike kaj numismate,

Bert

24.10.2019 19:54

Mi supozas ke numismatoj ne propagandas ĵetadon de moneroj aŭ medaloj por decidi pri io... sed, neeviteble ĝi okazas... kaj... ĝi rilatas al monetoj... Ĉu?

Mi pripensis tion sed forgesis aldoni la ideon!

Petro

24.10.2019 20:26

Saluton Petro!

Dum unu semajno mia komputilo estis kaduka pro virusa atako, sed nun denove, almenaŭ laŭ la komercisto, kiel nova.

Mi tre atente legis viajn proponojn, ĉefe pri ekzemplocelaj frazetoj. Bona ideo sendube, sed por ŝpari energion kaj spacon, mi preferus citi paĝojn en PIV (ekz. "PIV 199") kaj en Esperanta Numismatiko (ekz. "EN, jk, n-ro 3, p. 15") kaj nur aldoni mem frazetojn se ne aliloke troveblaj). Nu, poste ni povos interkomuniki surloke.

Amike kaj numismate,

Bert



20.10.2019 12:36

Karaj Geamikoj!

Jen interesa, bela, tre valora retrevuo.

Bonan legadon deziras

Ludoviko Molnár

PS.: Precipe mi proponas tralegi la 44-an paĝon, kiu invitas Vin aliĝi al ENA...

21.10.2019 14:48

Kara amiko Ludoviko!

Kvankam mi ne konas tiun grupon, mi estas tre dankema pro via nova iniciativo por varbi pliajn membrojn kaj diskonigi nian fakgrupon!

Amikajn salutojn al vi kaj kara edzino!

Bert



20.10.2019 15:21

Estimata Bert Boon,

Ĵus mi legis la tre belan plej freŝan n-ron de via revuo, kie bedaŭrinde embuskis unu grava eraro: 100a UK en Lillo disvolviĝis en 2015, NE en 2017. Ĉu eblas ankoraŭ korekti la jaron al 2015, en la revuo?

Krom tiu ĉi rimarko, la revuo estas tre bela kaj enhave atentokapta.

Kun miaj plej amikaj salutoj,

Anna Bartek / Anjo Amika

membro de la 50-jara Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo

21.10.2019 14:33

Estimata Sinjorino Bartek! Kara samideanino Anna!

Vi tute pravas! Bedaŭrinde ne plu eblas korekti la eraron en la aktuala numero, sed mi intencas fari tion en la rubriko "De ni...por ni" en la venonta numero.

Dankon do pro via prava rimarko kaj pro viaj afablaj komentoj koncerne nian revuon. Tio vere estas instigo por ni.

Amike kaj numismate,

Bert Boon



21.10.2019 18:04

Kara Heidi!

Dum kunveno de veteranoj en Antverpeno Flory reklamis por viaj valoraj projektoj en Angolo kaj samtempe promesis poste dissendi informojn pri la eblecoj subteni vin.

Tiurilate mi havas peton al vi. Antaŭ nelonge la Banco de Cabinda emisiis du esperantotemajn neoficialajn "monerojn", kiujn mi dume povis aldoni al mia kolekto. Tamen mankas al mi informoj por povi sufiĉe komplete priskribi ilin en la revuo de ENA. Ne pre mi bezonas scii kiu estis la evento kiu kaŭzis tiun eldonon (ĉu viaj projektoj?). Krome kiom da ekzempleroj estas emisiitaj de ambaŭ moneroj kaj fine la nomon de la gravuristo-medalisto (+ eventuale koncizan biografion).

Klarige: en 2014 post malfondo de "La Hirundo" en Tienen, mi fondis unuafoje en la historio de Esperanto fakgrupon kiu intencas priskribi kaj studi per scienca metodo historiajn objektojn kiuj efike ilustras kaj pliriĉigas la historion de nia movado. Aldone mi tiurilate sendas al vi la novan numeron de nia revuo (jarkolekto 6, n-ro 4) por doni al vi ideon pri ĝi. Bonvolu legi nepre la lastan paĝon! Dankon!

Amike kaj numismate,

Bert



21.10.2019 19:54

Bert,

Konsultado de la retpaĝo https://en.wikipedia.org/wiki/L.G._Balfour_Company sugestas ke la kompanio ekde la 1990aj jaroj estis en Austin. Serĉado de la vortoj 'Balfour Austin AAE' sendis min al <https://www.aae.org> - American Association of Endodontists. Verŝajne do estas neniu rilato al Esperanto, kvankam mi ne bone komprenas la rilaton inter la objekto kaj <https://en.wikipedia.org/wiki/Endodontics>.

Roland



☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

21.10.2019 22:33

Kara Bert,

Ni ĵus alŝutis al la Fejsbuka paĝo por la venontjara UK “reklamon” por medalo.

<https://www.facebook.com/1523175884567268/posts/2358386184379563?sfns=mo>

Kiel mi menciis al vi antaŭe, la ideo estas kolekti antaŭmendojn por ke ni sciu pli malpli kiom da ekzempleroj ni povas presi. Mi jam ricevis kelkajn pozitivajn respondojn.

Ĉu vi povus afable sendi similan mesaĝon al la membraro de ENA?

Mi certe esperas ke ni povos krei belan medalon por memorigi la UK en Montrealo.

Amike,

Garry

25.10.2019 20:03

Kara Garry!

Pro severa virusa atako mia komputilo ne plu funkciis, jen do la kaŭzo de la silentado.

Mi gratulas vin kaj vian skipon pro la skizo de la medalo, kiu promesas profesion kaj belan memoraĵon! Verŝajne vi ne jam havas ideon pri la sendokostoj al Belgio, tamen mi jam volas konfirmi la mendon de 4 ekzempleroj, du por amiko kaj du por mia kolekto. Kiam mi scios la kromajn kostojn, mi pagos je via konto.

Evidente mi dissendos baldaŭ la reklamilon al niaj 133 individuaj kaj 20 asociaj membroj. Krome mi ankaŭ petos publikigi ĝin en la revuoj MONATO kaj HORIZONTAAL (Belgio), en LA BULTENETO de Walter Klag (Vieno), TURKA STELO k.a. revuoj.

Mi deziras sukceson, ĉar via projekto meritas rekompencan!

Amike kaj numismate,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

ANONCOJ

&

EVENTOJ

Karaj ENA-membroj kaj legantoj de “Esperanta Numismatiko”!

Ni entuziasme anoncas al vi la probablan eldonon de arĝentita memormedalo okaze de la venonta UK en Montrealo. Tiu medalo estas la unua kanada esperanto-medalo, do ankaŭ la unua kanada UK-medalo.

La redakcio de ENA, same kiel por la UK en Seulo, sukcese instigis la LLK-n de Montrealo kaj kunlaboris, respondante tiurilatajn demandojn kaj donante konsilojn por sekura, profesia kaj plejeble ĉipa eldonaĵo.

Dorlotu vin mem per ĉi tiu eksterordinara medalo, la plej perfekta kaj daŭra elpendaĵo de la plej grava evento de la nova jaro en Esperantujo.



UK-glumarko 2020
Montrealo (mendebla
nur ĉe UEA)!

Karaj, la montreala LKK volus presi memormedalon de la UK. Tamen, por ke ni ne faru malprofiton, ni devas pli malpli scii antaŭe, kiom da medaloj ni kredeble povos vendi. Se vi interesiĝas pri la aĉetado de tia medalo, bv. sendi mesaĝon al Garry Evans, kasisto de la LKK: garryoevans@gmail.com. Ne estos devige aĉeti medalon, sed via mesaĝo donos al ni pli precizan ideon, kiom da medaloj vendiĝos. La medalo estos el polurita arĝentita bronzo, kun diametro de 38 mm, kaj aspektos kiel la ĉi-afiŝitaj desegnaĵoj. Ĝi kostos 60 kanadajn dolarojn (aŭ 45 usonajn dolarojn, aŭ 42 eŭrojn) por ĉiu ekzemplero, inkluzive de luksa skatoleto, plus poŝtaj kostoj (sed sen tiaj kostoj, se vi kolektos la medalon dum la UK). Vi eventuale povos pagi pere de PayPal aŭ al nia UEA-konto.

Garry Evans, kasisto de la LKK

Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ses jaroj ĝis 138 individuaj membroj kaj 21 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA 2018 sur p. 66-67. Se vi dezirus pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be!

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”